

Gazeto *Andaluzia*

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO


12a

Jarkolekto

*

Decembro, 1995

N-ro 44



GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

Efika Esperantismo / 11	3
Entrepreno Pulso	5
e=mc ²	7
Survoje al universala civilizacio	8
Leĝpropono pri Esperanto	10
Krucvortenigmo	12
Poezia angulo	14
10 sciindaj aspektoj pri Esperanto kaj spaco	17
Paĝoj de nia Historio	19
Radioamatora angulo	20
Komunikaĵo kontraŭ la nukleaj provoj	21
Ordinara Asembleo de AEU	22
Jarindekso 1995	23
Esperanto Aplikata	24

Finiĝas jaro, kaj ĝi ĵen lasta numero de *Gazeto Andaluza*... Novaĵoj estas du: komputila eldono de nia revuo, kaj jarindekso, pere de kiu ni volas faciligi al vi la legadon de malnovaj numeroj ...

Kaj kiel kutime aro de artikoloj por vivigi vian esperanton kaj alproksimigi vin al la kulturo de nia ŝatata lingvo...



Efika Esperantismo / 11

Esperanto kaj la esperantismo naskiĝis antaŭ unu jarcento sub la menso, volo kaj agado de Zamenhof. Kio instigis al li entrepreni, ĝis elĉerpiĝo, tiun ideon kaj agadon? Okazis, ke en lia naskiĝurbo Bjalistoko, historie apartenanta al Litovio, siatempe al Rusio kaj nuntempe al Pollando, pli kunestadis ol kunvivis diversaj miksitaj gentoj kun apartaj moroj, kutimoj, lingvoj kaj eĉ religioj. La kunvivado inter ili estis malfacila kaj ofte okazis pogromoj kontraŭ la hebreoj.

El propra sperto, Zamenhof pensis, ke tiu socia stato devas ne plu daŭri. Tial, ke la precipa videbla disiĝo inter tiuj gentoj estis la lingva, li elpensis krei lingvon intergontan tuto neŭtralan por la sociaj interrilatoj: ke la gontaj lingvoj restu nur familiaj, kaj publike ĉiuj parolu saman lingvon. Plie, li ankaŭ komprenis, ke kio okazus malgranskale inter gentoj en sama lando, ankaŭ estu aplikata mondscale por ke la homaro povu ankaŭ pace kunvivi. La lingvo Esperanto prosperis antaŭ la Unua Mondmilito, tamen, la ideo de Zamenhof pri la esperantismo ne sufiĉe enradikiĝis en Francio, en kiu Esperanto estas pli devastigita. La francoj estis patriotoj kaj ankoraŭ restis freŝa en la memoro la afero Dreyfus, rilate ties hebrecon. Krome, en orienta Eŭropo, kie la genta apartiĝo gravis, la devastiĝo de la esperantismo estis bremsata de la rusa carismo.

En 1914 eksplodis la Unua Mondmilito. La militŝtormo forbalais ĉion humanan kaj krom perdo de vivoj kaj materiala ruiniĝo oni spertis moralajn kaj ideajn elfalojn. Zamenhof estis relative juna, 59-jara, kiam forpasis en militempo, kaj la esperantismo restis orfa.

Okazis la rusa revolucio, kiu allogis amasojn. Alvenis ĝenerala ekonomia krizo. Aperis la faŝismo en Italio kaj la naziismo en Germanio. La esperantismo vegetis.

Dum tiuj ŝtormaj tempoj, la esperantismo povis ŝajni naiva, sed la nenaivaj cirkonstancoj kondukis la amasojn al la Dua Mondmilito. Mortigoj, detruado, kaj fine la atombombo. Al la Dua Mondmilito sekvis la nomata malvarma milito. La esperantismo ne povis modifi la historiajn eventojn. La amasoj delasis pensi pri estontaj Arkadioj (1) kaj la esperantismo restis kiel nura lingva movado. Tra la mondo disvastiĝis la angla-usona lingvo, kaj Esperanto estis nur la neŭtrala lingvo internacia. Tiu neŭtraleco ne allogis la junulojn nek la amasojn nek la intelektulojn kaj la esperantismo daŭre vegetis.

Forfalis la rusa komunismo. Finiĝis la tiel nomata malvarma milito. Oni jam konsideris novan mondmiliton neebla, ĉar la tuta homaro riskos pereigon.



Hodiaŭ la komunikado etigis la mondon. La homaro materiale unuiĝis, sed ne laŭ spirito. La mensa inerteco, pro la hereda ŝarĝo de tuta pasinteco, bremsas la disvastigon de novaj spiritaj valoroj. Ne ĝeneraliĝis la penso, ke laŭ la nunaj cirkonstancoj estas deviga la homarunuiĝo por povi solvi la aktualajn sociajn problemojn. Sen adekvataj supernaciaj institucioj ne eblas racie solvi la distribuadon de krudaj materialoj aŭ ties elĉerpiĝo, la reguladon de la fontoj de energio, la ekonomiajn krizojn, kaj precipe, malebligi la militojn kaj la perfortajn revoluciojn.

Antaŭ tiuj aktualaj cirkonstancoj, multaj homoj, pro estonta nebula sorto, rigardas malantaŭen. Renaskiĝas la samaj nacionalismoj, kiuj instigis la volon de Zamenhof krei Esperanton. Nia socio drivas pro manko de orientiĝo, kaj bedaŭrinde, ankaŭ la esperantismo.

Tiel same la etnaj nacionalismoj, kiel la imperiaj nacionalismoj, devas transformiĝi en planedan patriotismon. La nacionalismo estas politika ideo de la romantikismo. La lokaj kaj ŝtataj patriotismoj devas resti kiel naskiĝlokaj patritismoj, necesas komuna planeda patritismo.

Propra agado de la esperantismo estas impulsi la homarunuiĝon. La plej granda bariloj por la homarunuiĝo ne estas la materialaj, sed la mensaj; estas la imperiaj naciismoj kaj la etnaj, estas la ŝtataj nacionalismoj. Ne estas facile ŝanĝi jarcentan mensostaton, kaj sen tiu pensmaniera ŝanĝiĝo ne eblas la homarunuiĝo.

La Eŭropa unuiĝo malfacile prosperas pro tio, ke ĝi ankoraŭ ne estas enkapita kiel necesa de multaj intelektuloj kaj la amasoj. Des malpli estas enkapita la homarunuiĝo. Neniu kultura kaj socia movado impulsas ĝin.

Ni, esperantistoj, meditu kaj pripensu, ke precize Esperanto estis kreita de Zamenhof cele unuigi la homaron. Dum jarcento la esperantismo ne atingis ĝeneraligi tiun penson kaj eĉ multaj esperantistoj ĝin ne agnoskas. Nun tiu ŝanĝo de la pensmaniero estas urĝa. La celo de la esperantismo fariĝis la plej grava de la nuntempo.

Alvenis jam la horo en kiu la esperantismo devas esti la plej forta spirita movado por forigi de la historio la militon ebligante planedan organizon de la homaro, kapabla por aranĝi la komunajn problemojn kaj krizojn. Tio estas la alveno al nova historia etapo de planeda civilizacio.

GIORDANO MOYA

(1) PIV - Arkadio: 2 (f) Ideala paŝtista paradizo.



Nia poŝtkesto **Entrepreno Pulso**


Pro la ekonomiaj ŝanĝoj en Pollando antaŭ tri jaroj mi ekfunkciis entrepreneton *Pulso*. Mi ankaŭ partoprenis seminarion pri internacia komerco ĉe Lodza Politekniko.

En lernejoj mi sep jarojn lernis germanan lingvon kaj ankaŭ iomete mi lernis la anglan. Sed bedaŭrinde, la naciaj lingvoj estas tiom komplikaj, ke vere mi ne regas ilin. Pro tio ĉi mi en miaj internaciaj kontaktoj uzas nur Esperanton. Miaj kontaktoj kun Okcidentio en Esperanto sur komerca kampo ne sukcesas, ĉar tie firmaoj ne uzas Esperanton. Pro kresko de privataj entreprenoj en Orientio, mi turnis min al miaj najbaraj orientaj landoj kaj mi tie trovis kunlaborantojn. Per Esperanto mi bone kunlaboras kun Litovio kaj mi volas plilarĝigi la kontaktojn kun Ukrainio, Bielorusio kaj Rusio. Malgraŭ malgranda komerco kun Okcidentio (mi tie eksportis kopiojn de la ikonoj faritaj en mia regiono), mi povas diri, ke plej profitodona komerco nun estas en niaj landoj, malgraŭ tio, ke preskaŭ ĉie regas granda malriĉeco. Sed tie homoj volas progresi, pli bone vivi, do ili devas multe labori kaj ankaŭ multe bezonas ekipaĵojn en hejmo, novajn ilojn, diversajn modernajn

maŝinojn, ktp. Pro tio mi provis kontakti kun entreprenoj en Okcidentio por importi diversajn ilojn, sed vane; en Esperantujo tie ne estas E-entreprenejoj.

Pro via E-komerca agado mi volas turni min al vi. Ĉu estas ebleco interŝanĝi informojn pri komercaj aferoj kun ia firmao en via regiono por estonta eventuala komerco? Sed ne estu tro entuziasma – tia komerco ne estas facila pro granda distanco, sed ni povus trovi konkurenca varon... mi pensas, ke ebla (ni nuntempe importas spinaĵon el Koreio).

En mia urbeto kreskas privataj entreprenoj kiuj produktas duonŝtrumpojn, virinajn ŝtrumpopantolonojn kaj aliajn kunligitajn kun teksa industrio. Ni importas diversajn maŝinojn necesajn al tia produktado. Pro nesufiĉa produktado de la spinaĵo en Pollando kaj ankaŭ pro konkurenca prezo, ni importas





diversajn spinaĵojn. Se en Hispanio estas entrepreno, kiu okupiĝas pri tia produktado, komerco per tiuj varoj, mi tre volonte faros kun ĝi interŝanĝon; eble ni trovos ion por internacia komerco. Sed por tiu interŝanĝo estas neceso, ke la firmao en niaj kontaktoj uzados kiel internacian lingvon Esperanto, ĉar mi rifuzas

fari interŝanĝon en alia lingvo, ĉar tio postulas tempon, aldonan laboron kaj ofte estas miskomprenoj. Ĝis nun mia entrepreno tre bone laboras per Esperanto kaj mi plu ne volas dungii fakulojn de aliaj lingvoj, ĉar ofte vere ili ne estas tre kompetentaj.

ING. STANISLAW STASZEWSKI



Feliĉan Kristnaskon
kaj Bonan Jaron
1996!



deziras al vi la
redakcio de
Gazeto Andaluza
kaj la estraro
de
AEU.



$$e = mc^2$$

La KD-ROM

Ĉiuj ni scias kio estas KD, aŭ kompakta disko, ĉar antaŭ kelkaj jaroj ili ekanstataŭis la muzikajn diskojn kaj kasedojn, ĉefe pro la kvalito kaj pureco de la muziko. Kvankam ili komence estis pli multekostaj ol la normalaj muzikaj diskoj, la daŭra kaj masiva produktado provokis, ke hodiaŭ la prezoj de ambaŭ iloj estas pli malpli similaj.

Rapide la informatikaj entreprenoj, precipe la nederlanda

Philips kaj la japana Sony, komprenis ke ĉi diskoj taŭgas ne nur por enhavi muzikon ene de ili, sed ankaŭ programojn kaj informatikajn konitaĵojn. Ĉi tiel naskiĝis antaŭ kelkaj jaroj la CD-Rom (Compact Disk-Read Only Memory = Kompakta Disko - Memoro nur Legebla). Unu el la ĉefaj avantaĝoj de ĉi diskoj estas la grandega enhavo, proksimume 600 megabajtoj. Pensu ke la disko mezuras nur 12 centimetrojn; normala 3½cola (=pli malpli 8 centimetra) disko kapablas enhavi nur 1'4 megabajtoj.

Sed la plej grava fakto de la KD-ROM estas, ke dank' al ili naskiĝis nova koncepto en la informatika mondo, la *multimedia*, t.e., programo kiu kapablas oferi, krom konitaĵoj, ankaŭ movon kaj sonon, kio sendube helpas kaj allogos la uzadon de la programoj. Ekzemple, imagu la uzadon de programo kiu enhavas enciklopedion ene de ĝi. Nu, la serĉado de vortoj aŭ konceptoj, krom plia rapideco, estas pli alloga kaj kompleta ĉar la konitaĵoj sur la ekrano estas akompanataj de sono, voĉoj aŭ movoj. Ni vidu, ekz., en tiu imaga programo la vorton Esperanto, kune kun la informo pri ĝi la programo kapablos laŭdiri vortojn, frazojn, aŭ eĉ kanti la esperantistan himnon.

Kaj pri la kosto? Nu, normale oni vendas la KD-ROM lektilojn kune kun son-reproduktilo kaj du laŭtparoliloj. Ĉi aro povas kosti inter 30000 kaj 75000 pesetojn, laŭ la kapableco kaj kvalito.

J.M.R.H.



Recenzo


Survoje al universala civilizacio

Moya, Giordano, *Survoje al universala civilizacio*. 206 pĝ. 20 x 13'5 cm. Eld. Barcelona Esperanto-Centro. Barcelona 1995. Mendebila ĉe Libroservo de HEF. 1300 ptoj + sendokostoj.

La aŭtoro estas konatulo de la legantoj de *Gazeto Andaluza*: ĉinumere oni povas legi lian 11an artikolon en la serio *Efika Esperantismo*, kie li klopodas montri, kiel Esperanto povas helpi unuigi la mondon kaj tiel, iĝi grava parto de la homaro. La esearo kompilita en *Survoje al universala civilizacio* analizas la evoluo de la homaro de animaleco ĝis la nuno, de diversaj vidpunktoj: historia, kultura, teknika, ktp. La teksto estas dividita en kvin ĉapitrojn: radikoj (konceptoj pri naturo de la homo, la vivo, la

kulturo...), historio (konciza priskribo de la historio), naturaj kaj kulturaj faktoroj en la evoluo de la homo, gravaj eroj de la historio de la dudeka jarcento (la militoj, etnaj kaj revoluciaj; la disputo Nordo-Sudo; la ekologio...) kaj fine, la celo de la libro: homarunuigo.

Homarunuigo nepras nuntempe: la disputoj inter diversaj socioj ne plu solveblas pere de milito, kiel ĝis nun, ĉar mondmilito povus pereigi ĉiujn, pro la atomaj bomboj (kurioze, la terminologio pri tiaj bomboj





kaj la civila uzo de tia energio estas iom stranga: atoma kaj nuklea energio verŝajne volas montri la distingon inter fisia kaj fuzia atomenergioj); homaro unuiĝis materiale, la problemoj do estas mondiskalaj, sed la nunaj atomaj armiloj ne povas uziĝi, ĉar tio destruiĝos ne nur la militantojn sed la tutan homaron. La nura solvo estas *demalsupra* homarunuiĝo, t.e., la popoloj volu unuiĝi. *Desupra* unuiĝo nur pliigus naciismojn kaj novajn militojn.

Ege gravas en la idearo de Moya la klerigo de la homoj kaj la neceso por plia edukado; nesufiĉa klerigado de la popoloj estas la kialo de la nesukceso de multaj revolucioj kaj sociaj teorioj: "sen mensa scio en eblas organizi sin por starigi kaj regi demokratan ŝtaton". Demokratio, eĉ se ne perfekta, estas plej bona politika sistemo, ĉar ĝi nenie povas esti devige starigita: la civitano ĉiam devas kunlabori.

Aspekte, la libro estas tre kontentiga: bone presita, ne mankas paĝoj, havas belan kovrilon. Bedaŭrinde, ne

mankas kialo por malkontento: preseraroj. Ŝajne, la libro estis komputile kompostita, kiel multaj nuntempe. Komputiloj ege faciligas la aperigon de libroj, sed oni nepre presprovu la libron: iu, krom la aŭtoro, devas zorge kontroli preserarojn, kiuj svarmas sur la paĝoj de la libro. Ĉi tiu problemo konos ĉiujn (eĉ la redaktoro de ĉi revuo) kiuj volas aperigi tekstojn esperantlingvajn sen multaj (homaj aŭ monaj) rimedoj. Se ni esperantistoj volas eldoni indajn librojn, ni kontrolu ĉion. Plej ĝenas tiaj eraroj pro tio, ke la libro estas interesege, ne nur pro la ideoj de Moya, sed ankaŭ pro sia ĝeneraliga karaktero: ne temas pri specifa analizo de iu punkta afero, sed de monda problemo. Pro tio en la libro oni trovas etajn erarojn pri historiaj datoj; pli ĝuste ne temas pri eraroj, sed pri ĝeneraligoj (kiuj ne ĉiam povas klarigi ĉiujn historiajn okazaĵojn).

Resume, leginda libroj kun etaj makuloj korigendaj en onta eldono.

SIZIFO



Leĝpropono pri Esperanto

En la franca parlamento oni prezentis la jenan proponon, pri kies rezulto ni informos vin.

Gesinjoroj

De kiam la homoj kaj popoloj nodis rilatojn, strabo al komuna lingvaĵo ekzistas.

Ĉefe de 18a jarcento tradukiĝis tiu bezono per neniam estingita serĉe al universala lingvaĵo.

Nu, neniu el la 600 ĝis 700 projektoj pri universala lingvo supervivis morton de ĝia aŭtoro. Neniu iĝis vivanta lingvo.

Nur Esperanto sukcesis esti skribata, parolata lingvo laŭ ĉiuj sencoj de la vorto de pli ol jarcento. La kialoj pro tio multas kaj fondas ĝian rajton esti tiel agnoskita.

Komplete regula, simpla kaj fleksebla gramatiko, vortaro ĉefe eltirita el latina, franca, kaj malpie el germana kaj angla lingvoj kun ebleco de kvazaŭ senfina vortfarado kaj nuancoj ebligas al ĝi konkuri kun iu ajn natura vivanta lingvo.

Originala kaj tradukita literaturo, riĉa je pluraj dekmiloj da titoloj, ĉiaspocaj verkoj, multnombraj revuoj kaj gazetoj, senĉesa komunikado kaj interŝanĝo, donas al la Esperantista komunumo grandriĉecan kulturon, kompareblan al tiuj de *grandaj* lingvoj

La Esperantista Movado, en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo ĉeestanta, aparte aktivas en orienta Eŭropo. Per siaj kongresoj, aranĝoj, aktivaĵoj, ĝi faciligas tre riĉan interkomunikadon inter la homoj kaj popoloj. Ĝia senĉesa lukto por paco, amikeco inter la homoj kaj la popoloj, ĝia senĉesa lukto por progreso, demokratio, igis ĝin progresema kaj tolerema, inda je ĉies respekto.

Ĝenerala Konferenco de UNESKO (per siaj rezolucioj en 1954, 1985 kaj 1993) agnoskis la valoron de Esperanto en la Internacia komunikado. Esperanton multafoje uzas institucioj kaj entreprenoj (MSO, industriaj kaj komercaj foiroj, fervojaj kompanioj, turismaj oficejoj, sciencaj organizoj kaj revuoj, sociaj kaj politikaj movadoj kaj organizoj).

En Francio mem, enkondukon de Esperanto en la oficialajn programojn pritraktis pluraj leĝproponoj de niaj socialistaj kolegoj (proponoj num. 1667 de 1975 kaj num. 1550 de 1979) bonege konstruitaj kaj argumentitaj.

Tial aperas necese, ke Esperanto estu agnoskata kiel vivanta lingvo same kiel la nun instruataj lingvoj.



Aliflanke, Esperanto prezentas apartajn substrekindajn avantaĝojn. Ĉar ĝin posedas neniu popolo, Esperanto ebligas interŝanĝon liberan je ĉiu kultura imperiismo. Ĝi servas nur la homan komunumon en ĝia tuteco. Ĝi ebligis konservadon kaj konon de literaturoj de minoritataj lingvoj kaj popoloj.

Per siaj strukturo, vortaro, sintakso, Esperanto estas efika propedeŭtika ilo, tiel en lingvostudo, kiel en pliprofundigo de nia propra lingvo. Ege malpli malfacile lernebla kaj majstrebla, ĝi estas demokratia, malmultekosta lingva komunikilo. La instruista formado kaj lingvoinstruado montriĝas malpli kostaj ol por la aliaj lingvoj je egalvalora nivelo.

La Esperantista Movado permesas rektan kaj fruktodonan dialogon kun ĉiuj popoloj kaj homoj de la internacia komunumo konsistigantan interstreton inter ĉiuj. Tiel ĝi fortigas progreson kaj pacon, amikecon kaj kunlaboron inter la popoloj.

Ĉial necesas, ke Esperanto eniĝu en la lernejajn programojn kiel opcia lingvo. La kondiĉojn de ĝia instruado kadre de la servo pri nacia, publika kaj laika Edukado pritraktas la jena leĝpropono.

Unua artikolo

La studado de la lingvo internacia nomita *Esperanto* estas plenrajta kiel nedeviga fako en la programoj de unua kaj duagrada instruado.

Dua artikolo

En la ekzamenoj enhavantaj unu aŭ plurajn provojn pri ulilandaj lingvoj, la lingvo internacia *Esperanto* aldoniĝas al la listo de lingvoj validaj en tiuj provoj.


Tria artikolo

Opcia instruado de Esperanto progresivo realiĝos en la publikaj instruejoj de la Ŝtato.

Kvara artikolo


Transira periodo staros, dum kiu ĉiujare kunvenos Ĝenerala Konferenco ariganta ĉiujn koncernatajn partojn Tiu Ĝenerala Konferenco recenzos la bezonojn kaj rimedojn necesajn al disvolviĝo de la lingvo internacia *Esperanto*, en la unua kaj duagrada kaj

(Daŭrigo sur la paĝo 16)





Krucvortenigmo



Horizontale

- 1 Viro kiu havas simpation, emon al iu/io
 6 Kompleta.
 10 Tio, sur kio oni skribas.
 12 Malpovr'.
 13 Sufikso.
 14 Tia, ke oni povas ĝin meti al pli alta nivelo (adverbe).
 16 Akcepto, saluto, per favoraj krioj.
 18 Dio de la ventoj.
 19 Nekutime uzata persona pronomo.
 20 ..., vi, li, ŝi, ĝi.
 21 Tempodaŭro.

Vertikale

- 1 Prepozicio kiu indikas proksimecon.
 2 Prefikso.
 3 Greka litero, plej fama en geometrio (inverse).
 4 Adverbo kiu montras ne tre grandan kvanton da io.
 5 Organoj, per kiuj oni aŭdas.
 7 Aro da domoj, aranĝitaj laŭ stratoj.
 8 Il' por disfibrigi tigojn kaj por forigi la senutilajn partojn.
 9 Mi akiris pagante monon.
 11 Havanta formon proksimuman al tiu de ovo.



- | | | | |
|----|---|----|--|
| 23 | Orient'. | 15 | Sekse ami. |
| 26 | Adverbo kvanta. | 17 | Demanda vorto. |
| 28 | Peco de teksaĵo, ordinare
rektangula. Por tabloj, nazo, litoj... | 20 | An' de iu asocio, klubo. |
| 30 | Prepozicio. | 22 | Ripetita vokalo. |
| 32 | Neregula malfermaj' farita en
muro, heĝo, barilo... | 24 | Unuo de forto (=100
megadinoj). Sen finaĵo. |
| 34 | Moviĝu la aero. | 25 | Ĉina inko. |
| 36 | Organo servanta por elfiltri la
urininon. | 27 | Mara birdo. |
| 37 | Inter la ŝultroj kaj la kap'. | 29 | Sufikso. |
| | | 31 | Cifer', kiu montras neniun
kvanton. |
| | | 33 | Prefikso. |

Jen nova defio por niaj legantoj: ĉu vi aŭdacos fini ĉi tiun krucvortan enigmon? La difinoj estas jen facilegaj, jen malfacilaj...

Se vi aŭdacos sendi al ni vian solvon kaj ĝi estos korekta, vi povos gajni diskon de *Solo*. Sendu vian solvon al la redaktoro (p.k. 5184, 29080 Malago) antaŭ la 15a de februero, 1996.

Kelkaj aŭdaculoj sendis al ni la solvon de la lasta enigmo... ne nur de Andaluzio, eĉ de centra Eŭropo kaj norda Afriko... *La Imperia Ornaks* (promesitan premion por niaj legantoj) ricevos nia samideano F. Javier Romero Pareja, el Meliljo. Dankon al la aliaj partoprenintoj.

Jen la solvo al la krucvortenigmo de *Gazeto Andaluzia 43*:





Poezia Angulo

Kasido de l' alta um'

Frumatene.

Neniu nin vidis.

La tuta nokto kaj la rivero.

La tuta ĝardeno kaj l'ombro.

La tuta vivo.

Frumatene,

Kiam Vi volis...

Kasido de la Gracio

lam mi ĝin rakontos

ne sciante kiamaniere.

Ne ekzistas vortoj!

Temas pri senkiala ĝojo.

Estas la vivo iĝante

gaja kaj klara.

La riverbordoj festumas

La fasadoj buntas,

La rivero kantas.

Vi tion ne vidas se Vi ja sentas

Mi tion vidas sed mi ne atingas

kapti la gracion.

Kaj ĉiam okazas same

ĉar nia amo amuziĝas

fronte al Triana

JOAQUÍN ROMERO MURUBE

Sevilja poeto de nia jarcento

GLOSARO

Kasido: Poezia formo arabdevena, uzita, inter aliaj poetoj, de García Lorca.

Triana: Populara kvartalo de Seviljo, kiu troviĝas fronte al Seviljo trapasante la riveron Gvadalkiviro.





Zamenhof

La buŝoj brule kraĉis sangajn vortojn,
 la mond' flamiĝis, veis vana plend',
 kaj blinde serĉis vojon l' orfa homo,
 en fulmobril' mi vagis sen defend'.
 Ĉifonoj pendis de la korpoj homaj,
 inundo bruis, tondris roko-rompo;
 sed mi kredis, frato: flugis
 al la tor' kolombo.

Rifuĝis plore flampurpuraj nuboj,
 fantomamaso min minacis, - plej
 terure tomboj vomis ostomilon,
 ekiris sorĉe, ŝvele la marĉej'.
 Kredparkoj, sartoĵ dronis en la nokton,
 demon draŝadis, falis tondra bombo,
 sed mi vidis, frato: flugis
 al la ter' kolombo.

Ho, vane hom' blasfemojn diras al mi,
 ho, vane streĉas sin la sklava krim',
 ho, vane tentas min ĉiel', tertremo,
 bombardo, nubo ne teruras min.
 Ho, vane mi kirliĝas en kaoso,
 ne murdas mi, ne servas mi por tombo;
 diru kun mi, frato: -flugis
 al la ter' kolombo!

Ferenc Szilágyi

1895-1967, hungaro, poste sveda civitano; ĉefredaktoro de *Norda Prismo* (1955-1967). Poemoj en *Dekdu poetoj*. Kunredaktoris *33 rakontoj*. Verkoj: *Trans la fabeloceano*, *La granda aventuro*, *Inter sudo kaj nordo*, *Koko krias jam!*, *Tiel okazis aŭ Mistero minora*.

La Spegulfiguro

Mi timeme tiras min al ŝima
 muro,
 Sed estas alta, forta
 La spegulfiguro.

Dum silentaj horoj, je
 vesperpurpuro
 Severe min rigardas
 La spegulfiguro.

Super mi altiĝas en
 juĝistveluro,
 Disputas, juĝas, punas
 La spegulfiguro.

Trans la teron paŝas treme mia
 kruro,
 Teruras sur ĉiel' min
 La spegulfiguro.

Ĉio plore ploras, vanis eĉ la
 kuro,
 Ne havas korkompaton,
 Preparas sabrobaton
 Mil jarojn atendas super mi,
 tremanta mi,
 La spegulfiguro.



(Venas de la paĝo 11)

superaj instruadoj. Ĝi submetos al Ministro pri Nacia Edukado raporton pri tiuj elementoj.

Kvina artikolo

Dum la transira periodo, la Ĝenerala Konferenco submetos al la ministro liston de kompetentaj instruistoj kaj ekzamenistoj por ebligi la organizadon de instruado kaj de la ekzamenoj pri la lingvo internacia *Esperanto*.

Sesa artikolo

Rilate la instruadon kaj ekzamenojn, la kandidatoj havigos la samajn rimedojn kaj avantaĝojn de tiuj pri aliaj lingvoj.

Sepa artikolo

La instruista formado estos realigata kadre de Supera Instruado, kiu liveros la diplomojn atestantajn pri kompetenteco de la instruistoj kaj ekzamenistoj.

Oka artikolo

Dum la transtra periodo, Ministerio pri Nacia Edukado povos konsulti la privatan organizon nomatan *Franca Instituto pri Esperanto*, kiu liveros al la Ĝenerala Konferenco liston de diplomitoj en ekzamenoj, kiujn ĝi starigis ĝis la unua kunveno de la Ĝenerala Konferenco.

V. CHARLOT
el *La Internaciisto*

Insulo Esperanto

La insulo Esperanto en la rivero Danubo, en Bulgario, estas unu el la 985 eltrovitaj Zamenhof kaŭ Esperanto objektoj en 53 landoj. La kompleta ĉi-tema ilustrita dokumentaro aperos probable ankoraŭ antaŭ ĉi-jara Universala Kongreso en Finnlando.

La 8an de septembro 1930 la komunumo de apud-Danuba bulgara urbo Orjahovo (tiam nomo Rakovo) oficiale decidis donaci al la loka Esperanto-societo insulon por ties disponoj. Du tagojn poste, la 10an de septembro, okazis la oficiala inaŭguro de la insulo *Esperanto*...

La insulo (ĉ. 180 hektaroj [1 hektaro = 10000 m², pli malpli la surfaco de futbalstadiono],) apartenas al la plej grandaj en Danubo; intertempe, ĝi estas pliriĉigita je arbareto kaj plaĝo kaj fariĝis tre alloga loko por ripozado. Preciza situo, ĉe km. 672 de la rivero Danubo. En 1985, la insulo estis gastiganto de la Danuba E-Renkontiĝo; okazis oratora konkuro, filmprezentadoj kaj balo.

EL *ESPERANTO AKTUELL*, 2/95



10 sciindaj aspektoj pri Esperanto...

... kaj spaco


1. Ekde la jaro 1936 *Esperanto* ne estas nur internacia lingvo: en tiu jaro oni malkovris asteroidon ĉirkaŭ la orbito de la planedo Marso, kiu estis registrata kun la nomo de nia idiomo. Asteroido estas malgranda planeto nur videbla de potenta teleskopo. Same, en 1938 alia asteroido, ĉi-foje ĉirkaŭ la orbito de la planedo Jupitero, ricevis la nomon *Zamenhof*.

2. En la jaro 1957, Sovetunuiĝo lanĉis en la spacon la unuan artefaritan sateliton, kiu ricevis la nomon *Sputnik*. Ĉi vorto en la rusa lingvo signifas *sateliton*. En esperanto, kiel en ĉiuj lingvoj, ĉi nova vehiklo ne estis konato, do ekde tiu momento, *sputniko* signifas *artefaritan sateliton*.

3. Krom fotografi la plej lontanajn planedojn de la Sun-sistemo, la usona spacveturilo *Voyager*, lanĉita en 1977, havas la mision *informi* eblajn enloĝantojn de iu ekstersunsistema planedo. Por tio ĝi transportas metalan diskon enhavantan ĉiajn informojn pri la planedo Tero, la Homoj, nia Historio, niaj atingoj, ktp. Ĝi ankaŭ enhavas salutaron en centoj da lingvoj de la tero por iamaniere kontakti kiun tiu supozita ekstertera civilizacio. Kompreneble la disko enhavas ankaŭ interfratigan universan saluton en la lingvo universala, t.e., en Esperanto.

4. Harry Harrison estas fama sciencfikcia verkisto, krom honora membro de la Universala Esperanto-Asocio, kiu preskaŭ ĉiam aperigas kelkajn frazojn en Esperanto ene de siaj verkoj. La ĉefroluloj uzas ĝin por interkomprenigi sin kun anoj de aliaj planedoj konsilante la uzon de la universala lingvo al tiuj enloĝantoj de la plej teknikaj kaj perfektaj eksterteraj civilizacioj.

5. Sed ni pensu, "kiun lingvon ni devas paroli kun la eksterteranoj, se ni iufoje renkontas ilin?" Bona demando! Ĉu ne? Por solvi ĉi tiun problemon, nederlanda matematikisto Freuderhart ellaboris lingvon *Lincos* kun la celo esti utila kiel komprenilo inter la teranoj kaj la enloĝantoj de aliaj planedoj. Por ebla interesitoj oni devas averti





ke ĉi lingvo ankoraŭ ne estas komplete ellaborita.

6. Kiu estas la plej fama esperantista eksterterano? Sendube temas pri Mazi. La originale desegnita *Muzzy*, kreata de la BDC kiel metodo por lerni la anglan lingvon, estas ekde ĉijare nova lernilo de la internacia lingvo. Pola entrepreno adaptis ĉi metodon por instrui Esperanton. Mazi estas eksterterano kiu venas al la reĝlando Condolando. Ĉis nun oni vendis pli ol 1200 kopioj de videobendo enhavanta la novan instrumentodon, la sukceso de ĉi afbla eksterterano en Esperantio estas cortigita.

7. Hispanio estas sendube la lando kie oni eldonas pli da libroj en Esperanto pri Scienc-Fikcio. Ĉi tio ŝuldiĝas al la laboro de la grupo Nifo (Ne-Identigita Fluganta Objekto) kaj al ĝia plej grava reprezentanto, la kantabra Miguel Gutiérrez Adúriz. Li eldonas serion de scienc-fikciaj verkoj sub la nomo *Sferoj*. Ĉi jare li ankaŭ tradukis kaj eldonis la libron *La imperio Ornaks, ene de nova serio Future*.

8. En 1987 okazis en la bulgara urbo Vraca Esperanto-Seminario pri Kosmaj Esploroj. Temis pri la dua seminario ĉi--rilate. La andaluza samideano David Galadi kunlaboris en ĉi konferenco kun la eseo *Marso, post la biologia elreviĝo*.

9. Ĝis nun, neniu esperant-lingva frazo estis prononcata de astronauto en la spaco. Tamen, ĉiutage radio-programoj en Esperanto vojaĝas ĉirkaŭ nia planedo. Temas pri la esperant-lingvaj programoj de la Pola Radio kiuj disvastigas ankaŭ pere de la sputniko *Eutelsat II F3*.

10. *Aelita* verŝajne estas la unua sciencfikcia romano verkita en la Esperanto-literaturo. Ĝi estas traduko de la rusa verko de Alekseo Tolstoj. Ĝi estis eldonata en la jaro 1928 kaj en siaj 200 paĝoj rakontas vojaĝon al la planedo Marso per raketa aerŝipo venkante la tempon kaj la spacon.

J.M.R.H.



Se vi ne trovas en *Gazeto Andaluza* kion vi ŝatus legi bonvolu mem verki artikoleon. Ni volonte aperigos ĝin kondiĉe ke ĝi rilatu Esperanton aŭ Andaluzio. Se eble, sendu ĝin al la redaktoro (Poŝtkesto 5184, 29080 Malago) sur komputila disketo (PC aŭ Macintosh, kompreneble resendota) aŭ klare tajpita.



Paĝoj de nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

En 1910, koincide kun la apero de la unua esperantista revuo en Andaluzio, *Gazeto Andaluzio*, naskiĝis filo ĉe la familio de S-ro José Garzón Ruiz, eminenta advokato en la uro San Fernando (Cádiz), fervora esperantisto kaj direktanto de tiu revuo. Li decidis nomi tiun filon *Francisco de Asís Esperanto*, kaj tiel la ĵusnaskita bebo estis la unua persono en la tuta mondo kiu ricevis la nomon *Esperanto*.

Kio okazis al li? Bedaŭrinde ni havas nenian plian informon pri li, kaj pro tio ni ne scias ĉu li plenaĝiis (alia okjara filo mortis ankaŭ en tiu sama jaro). Pri lia patro, José Garzón Ruiz, ni povas diri al vi ke dum sia tuta vivo li estis olstara esperantisto kaj juristo, verkanto de kelkaj libroj pri Esperanto kaj pri juraj temoj, kaj ĝis nun li estas la sola andaluzia samideano kiu aperas en la verkego *Gran Enciclopedia de Andalucía*.



Ĉi konitaĵojn ni povas oferi al vi dank' al la ekzisto de la Arĥivo de AEU, kie ni volas gardi ĉion rilatan al la Esperanto-Movado de Andaluzio (la maldekstra foto unue aperis sur la unua paĝo de *Gazeto Andaluzia* num. 12, de decembro de 1910.) Verŝajne, ni tro pretende nomas tiun sekcion *Arĥivo*, malgraŭ la fakto, ke ĝi estas nur kolekto de antikvaj ĵurnaloj kaj esperantaĵoj. Tamen, ni volas krei veran arĥivon, la arĥivo de nia memoro. Do, se vi ne scias kion fari kun viaj E-revuoj aŭ esperantaĵoj kaj vi estas preta doni ilin al ni, bv. kontakti kun ni. Ni pagus ĉiajn sendokostojn.

HISTORIA ARĤIVO DE AEU

POŝTKESTO 611

E-14080 KORDOVO.

Ĉu vi jam sendis vian kotizon por 1996?



Radioamatora Angulo

Ni vidis en pasinta numero de nia revuo, ke la plej gravaj iloj de la komunikado inter du stacioj, t.e., elsendo kaj ricevo, estas la anteno kaj la elektromagnetaj ondoj. Ni vidu hodiaŭ kiom da potenco, laŭ kilometroj, estas la atingo de tiu komunikado reale.

Unue necesas diri ke ĉio, kion ni povos legi sur ĉi tiu paĝo, temas pri CB-komunikado, tio estas, komunikado inter du estacioj kiuj uzas la Civitana Bando, aŭ CB, t.e., inter 26'965 Mhz kaj 27'405 Mhz, frekvencoj tute malfermitaj por ĉiuj, nur estas necese peti permeson ĉe la Provinca Delegitejo pri Komunikado. Do, ĉi ĉio ne estas reale radioamatora elsendado, t.e., permesoj EA, EB aŭ EC, sed permesoj ECB, tiuj kiuj estas pli konataj kiel coboistoj, komprenata kiel normala paŝo antaŭ ol eniri en la alloga kaj magia mondo de la radioamatorismo.

Nu, ni parolu pri la distanco de la komunikado. Estontece estos eble uzi komunik-satelitoj por CB, tamen hodiaŭ ĉiuj komunikadoj realigas inter du stacioj surteraj (ankaŭ eblas surmare, kompreneble), ĉu en la kamparo, en la aŭtovojo aŭ ene de urbo.

En la kamparo aŭ en la aŭtovojo la kondiĉoj por radioelsendi estas pli favoraj, malgraŭ la fakto, ke la tero sorbas parton el la ondoj, kiuj kompreneble perdiĝas. Krome, ekzistas naturaj obstakloj, ekz. la montaroj, kiuj malfaciligas la komunikadon. Ankaŭ estas malsimile elsendi sur planaĵo, ene de valo aŭ sur la pinto de montaro. Ni povas aserti ke normala komunikado povas realiĝi maksimume je 30 kilometroj, kvankam kiel propra sperto mi povas mencii komunikadon je pli ol 100 kilometroj, sed kompreneble unu el la stacioj estis en tre alta loko.

Ene de urbo, la kondiĉoj ne estas tre favoraj, ĉar krom la altaj konstruaĵoj ekzistas radioelektraj perturboj ne konvenaj por klara komunikado inter du radiostacioj. Ĉi-kaze, do, la plej distanca komunikado eblas je 15 kilometroj, kvankam kompreneble ĉi tio povas ŝanĝi laŭ la loko kie oni situis la antenon, ĉar ne estas simile fiksi ĝin sur la balkono de unua etaĝo aŭ sur la teraso de sep-etaĝa konstruaĵo.

ECB7-I-046745
STACIO ESPERANTO




Komunikajo

Kontraŭ la Nukleaj Provoj

Andaluza Esperanto-Unuiĝo aliĝas al la kampanjo organizita de la Humanistoj en Malago kontraŭ la nukleaj provoj.

La informado estas fundamenta por ke la popoloj regu siajn destinojn. Tamen, ĝi estu vera, ne falsa. La franca kaj la ĉina registaroj, kiujn interesas plenumi siajn nukleajn politikojn, klopodas kontroli la amaskomunikilojn cele al la konduko de la koncerna loĝantaro, la tutmonda, al la silento aŭ al la rezigno.



Tamen, por ke la popolo povu decidi respondece pri aferoj rilataj al la internacia komunumo estas necese starigi porĉiaman fluon de senpera informado inter la loĝantaro de la landoj kiu kapabligu la personojn por decidi respondece. Kaj, por tio, estas necese ke oni uzu neŭtralan lingvon, kia Esperanto, lerneblan de la plejmulto el la homoj. Do, ni opinias ke la decidoj rilataj al la internacia komunumo devu esti natura rezulto de intensa interkomunikado plenumita individue, ne nur registare.

Ni rifuzas, do, la nukleajn provojn de Francio kaj Ĉinio pro la imponaj damaĝoj kiujn okazigas kaj ĉar ili estas senrespekta atako al la paca kunvivado de la popoloj.

A.E.U.



De antaŭ mallonge, AEU disponas pri elektrona / komputila eldono de *Gazeto Andaluza*. Temas pri *Windows*—dosiero kiu havigas al vi la eblecon serĉi aŭtorojn aŭ artikolojn presitajn, ...

Se vin aŭ iun konatulon interesas la ebleco havi ĉi tiu nova versio de nia revuo, bonvolu turnu vin al la redaktoro: poŝtkesto 5184, 29080 Malago.



Ordinara Asembleo de AEU

La pasintan 21an de oktobro kunveniĝis la Ordinara Asembleo de AEU en Malago. Venis samideanoj de Kordovo, Granado kaj, kompreneble, Malago. Post la diskutado, oni decidis:

- aprobi la protokolon de la pasinta asembleo
- aprobi la bilancon de la jaro 1994
- impulsi la uzadon de esperanto en turismo; la responda teamo konsistas el kvin malaganoj
- danki la samideanon J.M^o Rodríguez pro lia malavareco, ĉar li subvenciiis parton de la kosto niaj buĝenoj.
- aprobi la projekton pri partoprenado en la Libro-Faĵto en Kordovo la venontan monaton de aprilo
- pligrandigi la propagandon pri nia koresponda kurso
- kontakti la respondeculojn de la *Jarlibro de UEA*, por ke ili aperigu informojn pri nia asocio
- kontakti la bibliotekojn de Andaluzio, por la disvastigado de nia lingvo
- danki tiujn kiuj, per sia mono kaj laboro, helpas disvastigi esperanton
- daŭre labori sur la ekonomia kampo, per *Gazeto Andaluzia* kaj la kunlaboro kun la Komercaj kaj Industriaĵaj Ĉambroj
- kunlabori kun HEF pro tio, ke ĝi defendas esperanton en la tuta Hispanio
- klopodi enkonduki Esperanton en la Somera Universitato de Baeza
- disvendi biletojn de la Kristnaska Loterio, de la numeroj 21349 kaj 38715 [vidu Monate ĉe Vi, Novembro, 1995]
- daŭre rilati kun aliaj asocioj kaj individuoj interesiĝintaj en la aplikado de esperanto en la ekonomio
- ade kunlabori kun ERA, pro tio, ke tio estas taŭga ilo por disvastigi esperanton inter politikuloj

J.F.M.P.

AEU disponas korespondajn kursojn: bazan, mezan kaj superan. Diversajn prezojn, diversajn opciojn. Kaj vi ĉiam havos la helpon de koresponda instruisto. Kontakti AEU, p.k. 864, 29080 Malago.



Jarindekso 1995

Ekde ĉijare, ni intencas aperigi indekson pri ĉio, kio aperis sur niaj paĝoj, tiel faciligante la serĉadon de artikoloj kiujn vi ŝatis, kaj dezirus relegi. La indekso indikas nomon de artikolo aŭ aŭtoro; la grasigita numero montras la numeron de *Gazeto Andaluza*; la alia numero, la paĝon kie la artikolo komencas.

- 10 sciindaj aspektoj pri Esperanto kaj... 43,17; 44,17
- Alonso Núñez, Antonio, 42,10
- Alvoko al la prezidanto de la komitato por la homaj rajtoj, 43,9
- Anteno kaj la elektromagnetaj ondoj, 43,10
- Charlot, V., 44,10
- Dekalogo de la tekstoprilaboriloj, 42,8
- E.R.A., 43,9
- $e = mc^2$: la kd-rom, 44,7
- Efika Esperantismo / 10, 43,3
- Ffika Esperantismo / 11, 44,3
- Efika Esperantismo / 8, 41,3
- Efika Esperantismo / 9, 42,3
- Ĝis cent kvindek! (poemo), 42,14
- Enigmoj, 41,22; 42,22; 43,12; 44,12
- Entrepreno Pulso, 44,5
- Esperanta alfabeto, 41,12
- Esperanto Aplikata, 41,24; 42,24; 43,24; 44,24
- Esperanto kaj spaco, 44,17
- Fernández, Miguel, 43,14
- Financa Bilanco de AEU 1994, 41,11
- Historia Arĥivo de AEU, 44,19
- Insulo Esperanto, 44,16
- Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto, 42,16
- Intervjuo kun Antonio Alonso, 41,20
- Intervjuo kun Hugo Rodríguez, 42,5
- J.F.M.P., 43,19; 44,22
- J.M.R.H., 43,8; 43,17; 44,7; 44,17
- K.A., 42,21
- Kasidoj, 44,14
- Kiel aŭskulti pli bone? 41,8
- Klarigoj, 41,5
- Komento pri la proponoj de Navareño kaj Ojer pri Alfabet-reformo, 42,10
- Komerca Agado, 42,20
- Komunikaĵo kontraŭ la nukleaj provoj, 44,21
- Komunumoj aŭ esperantistaj propraj ŝtatoj, 43,17
- Kosmologio de Martinus, 41,10
- Krono de Sonetoj pri Esperanto, 41,16
- La lasta valso (poemo), 43,14
- La Spegulfiguro*, 44,15
- Leĝpropono pri Esperanto, 44,10
- Literatura Konkurso, 42,19
- Martín, A., 41,5
- Martín, J. F., 42,8
- Martinus-Instituto, 41,10
- Mi pensas, ke mi pensas erare, 41,18
- Mizero en Hispanujo, Mensogo!, 42,18



Moya, Giordano, 41,3; 42,3;
43,3; 44,3
Nekrasov, N. V., 41,19
Notoj pri Esperanto kaj
Andaluzio, 44,19
Ojer, Luis, 41,12
Ordinara Asembleo de AEU,
44,22
Paĝoj de nia historio, 44,19
Perkomputila Esperanto Kurso
(recenzo), 43,19
Pettyn, Andrzej, 41,8; 42,10
Pola Radio, 42,10
Politiko, Lingvo kaj Esperanto,
43,21
Por ke Esperanto restu viva!, 43,5

Radioamatora Angulo, 44,20
Recenzo: *Survoje al universala
civilizacio* 44,8
Romero Murube, J., 44,14
Schwartz, Raymond, 42,14
Sed, kio estas Esperanto? 42,21
Serrano Pérez, Luis, 41,18;
42,18; 43,21
Sizifo, 44,8
Someraĵ Lingvaj Aventuroj, 43,8
Stacio Esperanto, 43,10; 44,20
Staszewski, Stanislaw, 44,5
Szilágyi, F., 44,15
Szilvási, László, 43,5
Zamenhof, 44,15

Esperanto Aplikata

1. Cele al la starigo de Agentejo por informado pri industriaĵ bezonoj, oni serĉas kunlaboranton kapabla traduki anoncojn de produktivaj firmaoj por publikigo en diverslandaj ĵurnaloj. Oni pagos la laboron de la tradukanto. Adreso: J. Berczynski, str. Prosta 2, PL-05-075 Wesola k/Warszawy, Pollando.

2. La ĉina *Bulteno de Esperanta Komerco* bonvenigas vian senpagan anoncon por utiligi nian lingvon. Adreso: S-ro Wang Tiany, Xi'an E-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an, Ĉinio. La redaktoro certigas ankaŭ hejman tranokteblon por eksterlandaj E-vojaĝantoj.

3. Vizitu ortodoksajn bulgarajn

monaĥejojn unuope/duope en ĉiu jarsezono kun ŝtata eklezia klerigo. S-ro Hristo Dimitrov, str. Stracin 16, BG-7300, Kubrat, Bulgario.

4. Papelería Álvarez, Luis Braille, Local 8-B, 29007 Málaga. Tel.: 2611428. Apud Preĝejo Ntra. Sra. de la Amargura.

5. Perado de informoj, reprezentado, reklamaj kaj turismaj servoj; importo de konstrumaterialoj; eksporto de altkvalita blanka ŝtono (t.n. *inkerman* ŝtono). Agentejo "esse. S-ro Aleksander Fedorov, u. Sebastopolo-57, P.O. Box 168, UA 335057, Krimeo, Ukrainio.

6. Hu Renkui, fabrikestro, serĉas kunlaboron por produkti fridujajn



aparatojn. Bonvenas investado kaj modernaj ekipaĵoj. Adreso: Zhenzhen Kaiguan Chang, CN-315114 Ninghai, Zheijiang, Ĉinio.

7. Importo, eksporto, reprezentado, perado. Serĉas partnerojn: Kouablan International Co. Ltd., P.O. Box 3445, Accra, Ganao. Fakso: (233)776030 Rayberg.

8. Naciaj kaj internaciaj translokigoj. Ni havas sperton el pli ol 20 jaroj. Lingvoj: Angla kaj Esperanto Adreso: IMS, Ober Eschbacher Str. 118, 65352 Bad Homburg, Germanio.

9. Turismaj kontaktoj ĉiulande, akvo- kaj gas-tuboj de metalurgia uzino, sportaj aviadiloj. Adreso: Gennadij S. Mitrofanov, p.k. 36, RU-347924 Taganrog-24, Rostovskoj obl., Rusio.

10. Ellaborado de fadenoj kaj ŝpinaĵoj el diversaj sintezaj fibroj. Ŝnuroj: ĉiaj metodaj kvalitaj retoj por fiŝkaptado. Adreso: Redesmar, S.A., Apartado n° 2, 03360 Callosa de Segura (Alicante), Hispanio. Teleg. Redesmar; Telex 63380 TOLU; fax (96) 5310384.

11. Fabriko ellaboranta naturajn kaj sintezajn fibrojn. Ŝnuroj kaj fadenoj el agavo, kanabo kaj aliaj fibroj taŭgaj por agrikultura kaj industria bezonoj. Adreso: Rafia y Sisal, S.A., Apartado 20, 03360 Callosa de Segura (Alicante),

Hispanio. Telefono: (96)5312446; fax (96)5310441; teleg. MADELO.

12. En mia urbo kreskas privataj entreprenoj kiuj produktas duonŝtrumpojn, virinajn ŝtrujmpopantalonojn kaj aliajn varojn kunligitajn kun teksa industrio. Ni importas diversajn maŝinojn necesajn al tia produktado. Pro nesufiĉa produktado de ŝpinaĵoj en Pollando kaj ankaŭ pro konkurenca prezo, ni importas diversajn ŝpinaĵojn. Se en Hispanio estas entrepreno kiu okupiĝas pri tia produktado, komerco per tiuj varoj, mi tre volonte faros kun ĝi interŝanĝon. Nepre uzu Esperanton, ĉar mi rifuzas fari interŝanĝon en alia lingvo, ĉar tio postulas tempon aldonan laboron kaj ofte estas miskomprenoj. Adreso: PULSO, Inĝ. Stanislaw Staszewski, ul. Moniuszki 2, PL-95-070, Aleksandrov Lodzki, Pollando. Telefono kaj fakso: (48)(42)122218.

13. La entrepreno *Ib linguistiches bureau gmbh* ofertas diversajn servojn rilate al lingvoj (skribado kaj traduko de tekstoj, kompostado kaj presado), varbadon kaj informperadon surbaze de komputila datumaro. Pro la kreskanta laborkvanto, la entrepreno ankoraŭ serĉas kunlaborantojn ie en la mondo.



Ankaŭ investemuloj estas bonvenaj, ĉar la rapida kresko ne eblas sen pligrandigo de la kapitalo. Eblas bona profito. *Ib linguistiches bureau gmbh*, pf. 1539, D-82355 Weilheim, Germanio. Tel: +49-8809-757, fakso: +49-8809-1234.

14. NATURAJ AROMOJ. Aromokuracado. Naturaj produktoj inhalitaj efikas tiom kiom tiuj kiuj eniras la korpon englutitaj, injektitaj. GENTE GUAPA, S.L., Avda de la Rosaleda, 3-1^a dcha, 29008 Malago. Telef. kaj faks. (95)2216414.

15. Herbovendejo *Don Natural*. C/. Magistrado Salvador Barbero, 12, 29010 Malago. Telef. (95)2611117

16. Andaluza Esperanto-Unuiĝo proponas al vi:

—*Pandemonio*, aro da rakontoj de junaj hispanaj aŭtoroj (500 pesetoj)

—*Solo*. Disko de malaga esperantista muzikisto, ±25 minuta (500 pesetoj).

Plus sendokostoj. AEU, p.k. 864, 29080 Malago.

17. Komerce pretigita tekstoprilaborilo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde Vindozo 3.0. Helpsisitemo kaj manipulado pure en Esperanto. Enkonduka prezo 200 germanaj markoj. Adreso: Professional

Consulting, S-ro PEJNO Simono, Am Fülgarten 4, D-61250 Usingen. Tel. +49-6081-66722, Fakso: +49-6081-3955.

18. AZAHAR, herbovendejo kaj natura kosmetiko. Avenida San Sebastián 3, ejo 5, zona Eugenio Gross, Málaga. Horaro: 9-14 kaj 17-21.

19. Anhui United Enterprises Trading Co. Ltd. Dir. HUANG Zhengsu, Livan lu 26, Box 136, 230069 Hefei, Ĉinio. Faksilo: 86 551 2614014. La direktoro volas helpi per E-o dulandajn entreprenistojn en komerco kaj en partner-fabriko.

20. Firmao *Oderich*. Konservitaĵoj viandaj kaj vegetalaj. Rua Oderich, 807. 95760-000, S. Sebastião do Cai-RS Brazilo.

21. *Azaleia*. Ŝu-fabriko. Rua Dr. Legendre, 31, 95360-000 Parobé-RS, Brazilo.

22. BIG TRADE Comercio de Importação e Exportação (Importa kaj Eksporta Komerco). Rua Casemiro de Abreu, 281, 28880 Barra de São João-RJ Brazilo.

Ĉi tie oni povus legi VIAN anoncon. SENPAGE. Aŭ tiun de viaj amikoj, najbaroj... Simple skribu leteron al ni, kaj via anonceto aperos en nia venonta *Gazeto Andaluza*.

Casella Postale 1616 - 37100 VERONA

UNUA INTERNACIA ESPERANTISTA FESTIVALO "ROMEO KAJ JULIETA"

22an - 27an de Junio 1996

PROVIZORA PROGRAMO

TEMO: UNIVERSALECO DE LA LEGENDO PRI "ROMEO KAJ JULIETA" UNIVERSALECO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO"

Sabate 22/06	10.00 Alveno de la partoprenantoj disdonado de dokumentoj kaj donacoj. 12.00 Renkontiĝo kun gazetaro; 20.30 Interkona vespero;
Dimanĉe 23/06	08.30 Ekumena Diservo ĉe fama Preĝejo "San Zeno"; 10.30 Solena malfermo de la Festivalo; 15.00 - 17.00 Prelego pri la temo; 17.00 - En placo "Brà", promenado de muzika ensemblo kun "bastonistinoj"; 17.45 - Surteriĝo de paraŝutistoj en sama placo; 18.15 - Koncerto de Milita Aviada Muzika Grupo. 20.30: Arta vespero kun premiado de la venkintoj pri poemkonkurso; deklamado de la verkoj premiaj, aktoroj prezentos pecojn el la verko "Romeo kaj Julieta" kaj dancistoj same el fama baleto.
Lunde 24/06	Speciala festivala poŝta ŝtampo 09.00 - 12.30 Prelegoj pri la temo; 11.00 - 12.30 Vizito al la Urbestro fare de internacia delegitaro; 15.00 - 17.00 Prelegoj pri la temo; 17.30 - 19.30 Vizito al tipa vinvendejo; 20.00 - 24.00 Bankedo kaj festivala balo.
Marde 25/06	09.00 - 10.30 Vizito al pogranda nutraĵa merkato; 15.00 - 18.00 Prelegoj pri la temo; 20.30: Arta vespero;
Merkrede 26/06	Tuttaga Ekskurso sur la Lago Garda kun tagmanĝo surŝipe.
Ĵaŭde 27/06	10.00 - Fermo de la Festivalo; 14.00 - Historia tranĝo al la urbo.

POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ

Vendrede 28/06	Tuttaga ekskurso al Venezia
Sabate 29/06	Tuttaga ekskurso al Mantova

Speciala prelegoj pri la temo, specialaj prelegontoj, jen primicoj:

D-ro John WELLS

"ROMEO KAJ JULIETA": Etno kaj Eros

D-ro Renato CORSETTI

"ROMEO KAJ JULIETA": Kiam Romeo parolas un lingvon kaj Julieta alian ...

D-ro Claude PIRON

"ROMEO KAJ JULIETA": Psikologia portreto.

Kaj aliaj gravuloj, inter kiuj ni varme esperas havi ankaŭ D-ro Danny ten HAAF pri: "ROMEO KAJ JULIETA": ĉu plue aktuala por la nuntempa junularo?"

Aliĝu tuj, vi ĝuos je plej malalta kotizo kaj eblecon pli bone elekti hotelon.

Tuj anoncu vin al: VERONA ESPERANTO GRUPO "A.L. RENI" P.K. 1616 - 37100 VERONA - ITALIO -

La Prezidanto de Lo.Fe.Ko.
Salvatore Argentino

K O N G R E S A R E Z O L U C I O D E U E A

(Jen tiu de la lasta kongreso:)

Universala Esperanto-Asocio

salutante la 50-jaran jubileon de Unuiĝintaj Nacioj,

diskutinte pri la temo "Ni, la popoloj: unu mondo aŭ disaj eroj?" kadre de sia 80-a Universala Kongreso de Esperanto, kie kunvenis 2443 kongresanoj el 68 landoj de ĉiuj kontinentoj,

memorigante, ke la Esperanto-movado laboras jam de pli ol unu jarcento por disvastigi konscion pri la homaj rajtoj, inkluzive de lingvaj rajtoj, kaj por estigi pacan interkompreniĝon inter la homoj de ĉiuj landoj,

alte taksis la kontribuojn de Unuiĝintaj Nacioj al la paca solvo de konfliktoj, al la tutmondigo de la koncepto pri homaj rajtoj kaj al la konservado de la vivmedio,

esperas, ke per komuna kaj urĝa klopodo de la membroŝtatoj de UN tiaj agadoj fariĝos pli efikaj kaj rezultodonaj, interalie per ĉesigo de ĉiuj programoj por evoluigi armilojn de amasa detruado,

substrekas la nebran bezonon aktualigi la Ĉarton de UN por respondi al nuntempaj postuloj kaj aperontaj defioj, inkluzive ĝian demokratigon kaj rekonsideron de la principo de senkondiĉa ŝtata suvereneco,

alvokas la membroŝtatoj de UN trovi vojon al pli rekta kaj egaleca partopreno de la popoloj en la debatoj kaj decidoj de la Organizo, kaj lige kun tio

emfazas, ke la lingvo Esperanto prezentas elstaran rimedon por tutmonda sendiskriminacia komunikado, je niveloj interŝtata, interpopola kaj interhoma, laŭ la celoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj en la spirito de la Ĉarto.

XXXXXXXXXXXXXXXXXX
XXXXXXXXXXXX
XXXX